Kurt Morawietz,

En la nokto

tradukita de Manfred Retzlaff

Atendis mi vin tie ĉi.
La lumon dum la nokto mi
Ne estis estinginta.

La florbukedo kaj la vin',
Por vi ĝi estis - kredu min.
Ne estas vi veninta.

Ne scias la kialon mi
Kaj kiun buŝon kisis vi.
Ĝin scias eble iu.

Nur tion ja deziras mi :
Ke iu estu apud vi
Kaj vin konsolu tiu.

Traduko de la Germana poemo "In der Nacht" de Kurt Morawietz en Esperanton de Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2011-02.*

MR-515-01 / Arg-843-1698 (2013-02-26 22:47:12)